

Numero: 264.
Majo: 2014.

22-a jarkolekto

Literaturaj Folioj

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbel@t-online.hu
Eldonanto: Kapošvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

La plej bela monato

Universala lingvo

Onidire en nia regiono la majo estas la plej bela monato. La homoj atendas ĝin malpacience kaj ĉiu ĝojas, kiam en maja mateno birdoj ektrilas en la florodoraj ĝardenoj, kaj poste la varmetaj sunradioj ĉirkaŭbrakumas la arbojn, domojn kaj ĉion.

Ankaŭ mi ŝategas ĉi monaton. Majo donas al mi esperon kaj kredon. Mi feliĉe pensas pri la estonto. Mian koron kaj animon inundas bonega sento.

Mi preĝas, ke ĉi tiu eksterordinara sento restu por ĉiam en mia koro, eĉ en la koro de miaj homfratoj.

Mi estas esperantisto. Jam depost pli ol kvardek jaroj. Dum tio mi travivis multe da agrablaj momentoj. La zamenhofa lingvo instruis al mi estimi aliajn homojn, kiuj parolas diversajn lingvojn tra la tuta mondo.

La terglobo estas malgranda, tamen sur ĝi ekzistas multegaj lingvoj. Ni ofte malfacile komprenas unu la alian. La ĉiutaga komunikado ne estas glita pro la manko de helplingvo. Vere estas kelkaj grandaj, disvastiĝintaj lingvoj per kiuj la homaro ekprovas solvi tiun ĉi urĝan problemon.

La historio instruis al ni, tio ĉi ne estas facila, ĉar la uzon de tiuj ĉi "mondlingvoj" ofte influas la politiko, ekonomia situacio. Dum la historio de la homaro jam multfoje estis deklaritaj lingvoj naciaj, kies tasko estintus plenumigi la rolon de la internacia lingvo. Sed tion malhelpis la ĉiama politika situacio. kaj poste estis proponita ĉiufoje alia nacia lingvo, kiu laŭ la proponantoj estas pli bona kaj utila.

Inteligenta homo scias, tiun ĉi problemon nacia lingvo ne povas solvi. La homaro bezonas veran, sendependan, facile ellerneblan helplingvon.

Se dum bonodora maja vespero ni sidadas antaŭ nia domo kaj admiras la ĉielan firmamenton, ni pensu ankaŭ pri tiu ĉi urĝa problemo kaj ni geesperantistoj esperu, fine nia lingvo ESPERANTO estos universale uzata sur la terglobo.

-Redaktanto-



Kara Leganto! Kion vi pensas, se ni efektive renkontiĝos kun eksterteruloj, kiel ni povos komuniki kun ili? Ĉu ankaŭ tiam la angla povos konservi sian privilegecon? Nuntempe ĝin onidire uzas sur ĉiu tereno kaj la homaro solvis la grandan lingvan problemon. Ĉiu lernu la anglan lingvon, kaj sur Tero ne estos lingvaj malfacilaĵoj.

Certe nun estas multaj, kiuj diras, ke mi estas la malamiko de la angla lingvo. Ne pensu tion. Sed laŭ mi ankaŭ la angla estas nur ĉiutaga lingvo, kiel ankoraŭ multaj mil lingvoj en nia mondo. Ĉiam estos, kiuj adoras ĝin kaj estos kiuj admonas de ĝi sian gepatran lingvon.

Eble mi apartenas al la alia grupo. Ne plaĉas al mi la troa uzo de la anglaj vortoj en la hungara lingvo.

Antaŭ nelonge mi legis anoncon en iu gazeto, se oni aĉetas elektran aparaton, tiam senpage fuktiigos ĝin en la hejmo de la kliento. Hungare tiel estis la anonco:

INGYEN INSTALLÁLJUK LAKÁSÁBAN MEG
MEGVÁSÁROLT KÉSZÜLÉKET

INSTALLÁL estas fremda, anglodevena vorto. En la hungara vortaro estas anstataŭ ĝi BESZEREL (funkciigi, enmunti).

Tio ĉi estas nur unu ekzemplo. Ankoraŭ mi povus skribi ankaŭ aliajn. Ĉiutage ni spertas, kiel malpuriĝas nia bela, gepatra lingvo de multaj ĉefe anglodevenaj vorto.

Laŭ mi tiu ĉi fenomeno estas spertebla ankaŭ ĉe aliaj lingvoj. Antaŭ kelkaj tagoj mi legis artikolon, ke ankaŭ la francoj deziras purigi sian lingvon de tiaj vortoj kaj esprimoj.

Ofte ni hungaroj faras nenion kontraŭ tio, eĉ disetenditaj brakoj atendas, helpas, ke tiuj ĉi fremdaj vortoj disvastiĝu.

Tiu hungara junulo ne estas moda, kiu bele parolas la hungaran lingvon. Ankaŭ la akcento de nia lingvo komencas ŝanĝiĝi. Ni imitas en nia parolo la akcenton de la okcidentaj lingvoj kaj ni parolas tro rapide apenaŭ komprenate unu la alian, kvazaŭ ni ne havus tempon por esprimi niajn pensojn.

Oni diras, la mondo rapidiĝis. Dum minutoj, eĉ sekundoj ni deziras iri de A punkto al B punkto.

Ĉu tio estas bona? Kien ĝi kondukas, se simple, elegante ni ne povos komprenigi nin? Fine la homo ne bezonos buŝon kaj ni forgesos paroli. Ne forgesu, ankaŭ la bestoj, la plej malgranda insekto komunikas iel kun siaj kunulo kaj komunumo. Ĉu ni homoj estu tiom stultaj, ke ni ne povu komprenigi nin?

Tio ne estas sekvinda vojo.

Kion pensos pri ni la eksterteruloj, se fine tamen ili renkontiĝos kun ni? Krome per kiu lingvo ni komunikos.

-Ŝaŝa-

Vivobildo

(Verkis: Kósa Ella / Keisila/)

Esperoplene ŝi elsaltis el la lito, kiel en ĉiu mateno. La poŝtisto estas ĉi tie jam je la duono post la oka en kutima labortago ĝis tiam ŝi devos ordigi sin, ŝi ne povos ŝovpaŝadi al la leterkesto plumpveste, senkombe.

Ŝi atendis leteron.

Espero vivigis ŝin de post monatoj. En ĉiu tago ŝi vidis brile la mondon, eĉ ankaŭ tiam, se Suno ne ekaperis sur la firmamento pro la sobraj nuboj. Neniam oni scias al kiu tago brilos la lumo de la feliĉo, kiel diamanto.



Ŝi vivis sola de post la morto de sia edzo. Unusola filino loĝis de ĉi tie malproksime en fora urbeto. Unu nepo ŝia vojaĝis eksterlanden antaŭ du jaroj kun sia familio por trovi bonŝancon. La banko forprenis de super ilia kapo la domon, por ili restis nenio. La praaŭvino petegis, ke ili translokiĝu al si kun la etuloj, sed ili ne deziris vivi en tia lando, ke tio povas okazi al familio infana kaj ne ekzistas leĝo defendi ilin. Prefere ili foriras en fremdan landon, ja ili sentas sin, kiel fremdulo en sia propra patrujo. Ili prunteprenadis de la parencoj tiom da mono, ke ili povu ekiri al la nekonata mondo. De post tio ili estis hejme unufoje dum la enterigo de la avo. La vojaĝo estas multekosta.

Béci, ŝia nepo, tiam aĉetis por ŝi komputilon. Du tagojn li klarigis, kiel funkciigi ĝin, kion ekpreni, kien klaki... ŝi komprenis el ĝi eĉ unu vorton. Onidire eblas babladi kun ili senpage iamaniere, sed ŝi ne estis kapabla ellerni ĝin. Ankoraŭ ne. La najbara knabino venadis por instrui ŝin. Dio helpu ŝin por ke ĉi scienco fine eniru en ŝian malsaĝan kapon, kiel funkcias la maŝino kaj tiam ĉiutage povus paroli kun siaj anĝeletoj kaj Beĉjo.

Ŝi kaŭzas al ili zorgon, tion ŝi konas. Kaŭzas zorgon skribadi leterojn permane, sendadi fotojn al Hungario al la praaŭvino. Sed por ŝi tiu ĉi estas la vivo. Tiom restis je ŝia maljuneco. Atendi la poŝtiston ĉiumatene. Plori pro la feliĉo, kiam en la leterkesto kaŝiĝas letero, ploregi, se en ĝi estas nenio.

Sed ĝis tiam....

De la vekigo ĝis duono post la oka ĝis vivas la espero, ĝis tiam la mondo estas belega, la vivo estas dolĉa. Ĉefe en tiuj momentoj, kiam ŝi ekiras al la direkto de la pordego. Ŝi kuregus, kurus, kvankam ŝiaj maljunaj piedoj apenaŭ obeas, sed ŝi sentas, la atendado multobligas sian elĉerpiĝantan forton, kaj ŝi estus kapabla kuri ankaŭ kelkajn metrojn.



Sed ŝi ne volis. Ŝi deziris ĝui ĉiun momenton de la espero. Kiam ankoraŭ ŝi povas revadi, ke la leterkesto ne estas malplena, kiel hieraŭ, dum ŝi finpromenas sur la mallarĝa troturo ĝis la enireja pordo en sia mano tenante la ricevitajn sendaĵojn, larmokule ŝi kisas la koverton kun laodoro de Béci.

Ŝi kombis sin, el sia blanka hararo atingante la talion ŝi faris hartuberon. Sian ŝatatan, festan kaptukon ŝi trapremis ĉirkaŭ la kolon. Ŝi vestis sin en festa robo, kiel ankaŭ ŝia koro en tiuj momentoj. Kaj ŝi ekiris. Malrapide, tre malrapide ŝi paŝadis al la direkto de la pordego. Suno brilis kaj sur siringarbo turdo kantis foren aŭdantan kanton.

Sed post iom da tempo silentiĝis la birdeto. Turnante sian etan kapon ĝi rigardis per siaj nigraj okuloj palpebrumante sub la siringarbo la onjon forpaŝanta kaj ploreganta, kiel ŝi viŝadas siajn larmojn. Ĝi postrigardis ĝis fermiĝis malantaŭ ŝi la enireja pordo. Iom ĝi restis silenta ankoraŭ, kaj ĝi kantis plu....

-Tradukis: Apáti Kovács Béla-



Poezio

John S. Dinwoodie

La virtuoza

Trankvilmiena, digne serioza,
sen aflektemo, tute sen parado,
la grizehara majstro virtuoza
aperis antaŭ ni sur la estrado.

Li staris antaŭ siaj aŭskultontoj,
kvazaŭ ne muzikisto sed profeto
el la pratempo, el silentaj montoj
veninta urben kun vivinterpreto.

Per tuŝo firma tamen delikata
la pretajn kordojn li karese premis,
kaj, eltirite per la arĉo flata,
en la aeron riĉaj tonoj tremis.

Dum li la melodion glate plektis,
sur malproksimo restis la okuloj,
kaj en la muzik-riĉo sin reflektis
la nekonata mond' de l' viziuloj.

Facila ŝajnis tiu sonkompilo,
senpene elvokita, efemera,
miksaĵo el pasio kaj trankvilo,
la glora celo de la arto vera;

la glora celo ankaŭ de l' vivdramo –
ne fajr' saltanta en dancado febra,
sed daŭra, brila kaj sentrema flamo,
plena de la trankvilo nedirebla.

Li estis ne nur virtuoza' talenta
kun paradota ludlerteco,
ĉar ŝajne estis li indiferenta
al homdonataj laŭdo kaj apreco.

Li staris kun aspekto sacerdota,
celante ĉe l' Plejalto aŭdiencon,
la celebrant' de tiu rit' ekzota,
teren vokanta la ĉielpotencon.

Kaj pro subtila sento, ke ni venis
samcele kiel li mem, samspirite,
por ni kunadorantoj li solenis
la grandan sanktan feston muzikrite.

Li estis pastro benon disdonanta
de iu sakramento efektiva,
komunikanto de donaco sankta,
kanalo homa de la graco viva.

Poezio

John S. Dinwoodie

La soleca dio

Noktmezo kaj mallumo – unu stelo
briletis sur velura fon',
tutsola en la vasto de l' ĉielo;
veadis venta monoton'.

Rigardon ĵetis mi al nokto nigra;
mallaŭte en la malproksim'
aŭdiĝis krio de ansero migra;
animon mian skuis tim'.

Teruris tamen min nek la insido
de l' nokto, nek la birdo-kri',
sed kvazaŭ en abismon, la ekvido
en koron de soleca di'.

Solecon lian la natur' spegulas
en si fidele; ĉiu sent'
de l' granda universo-kor' modulas
la tonojn de l' multvoĉa vent'.

Sur la sennombraj montoj de l' eterno
majestas li en sol-seren',
la ĉion-direktanta vivokerno,
ekster la homa komprenem'.

Profundas tiom la soleco dia,
ke l' homo ne solecas pli
en morto-horo, ol en vivo sia
solecas en eterno di'.



Por infanoj

Ĉio ripoziĝas

Nun ĉio silentiĝas ekstere, ĉio, kio estis laŭta, vigla kaj bonhumora dum la tuta tago.

La sunu ekripozis, la floroj senrimarkeble fermas siajn odorantajn kalikojn kaj ili ekdormas: la floroj la blankaj lekantentoj kaj la ruĝaj rozoj, la bluaj sonorilfloroj, kaj la flavaj tulipoj ĉiuj ekdormas.

Ankaŭ la herboj kaj greno ripoziĝas.

Sur la kampojn ekkuaŝas milda vualo, tiel milda, kiel la spiro. Ankaŭ la birdoj ĉesas la kantadon, ili silente sidas en sia nesto kaŝante la kapon sub la flugilon.

La gajaj fiŝetoj serĉis pacan golfon en la malhelaj, inundantaj akvoj. La rivereto ankoraŭ kelkfoje plaŭdadas en sia sonĝo kaj poste ĝi silentiĝas. Eĉ jam ankaŭ la diligentaj abeletoj ne zumadas en la ĝardeno ankaŭ ili dormas en la bonodora elaro. La bruna ĉevalido, kiu saltadis dum la tuta tago ripozas en la stalo, eĉ la malgranda, blanka leporo jam ne saltadas sur la kampo.

Po unu misvojaĝanta ventego ankoraŭ trakuras la stratojn aŭ super la tegmentoj. Tie kaj tie ĝi ekskuadas la fenestrotabulojn, aliloke ĝi susuras inter lambrusko. Baldaŭe ankaŭ ĝi silentiĝas en la valo. Jam nur la hundoj estas sendorme, ili foje – foje eksaltas, ĉefe kiam la luno ekaperas sur la firmamento, aŭ la paŝoj de malfrua iranto frapadas sur la strato.

La tuta mondo estas silenta, pli silenta. Ĝi estas malhela kaj muta. Sur la firmamento mil steloj palpebrumas, la luno mole ŝutas sian lumon sur la teron. Jam ne daŭras longe, ankaŭ ĉiuj infanoj ekdormas en siaj ĉambretoj, ili sonĝas belon, kaj rideto kaŝiĝas sur ilia rozkolora vangeto.

-Onklo Adalberto-



Por infanoj

Brazila infana kanzono

PIEDON LA BUF' NE LAVAS (o sapo não lava o pé) (langorompilo)

Piedon la buf' ne lavas
Ĉar pigras la bufo, ho!
Bufo loĝas en lageto
Sed la piedo fetoras tro!
Piedfeter'!

Paadan la baf' na lavas
Ĉar pagras la bafa, ha!
Bafa laĝas an lagata
Sad la paada fataras tra!
Paadfatar'! Ba!

Peeden le bef' ne leves
Ĉer pegres le befe, he!
Befe leĝes en legete
Sed le peede fetores tre!
Peedfeter'! Ve!

Piidin li bif' ni livis
Ĉir pigris li bifi, hi!
Bifi liĝis in ligiti
Sid li piidi fitiris tri!
Piidfitir'! Fi!

Poodon lo bof' no lovos
Ĉor pogros lo bofo, ho!
Bofu loĝos on logoto
Sod lo podo fotoras tro!
Poodfotor'! For!

Puudun lu buf' nu luvus
Ĉur pugrus lu bufu, hu!
Bufu luĝus un lugutu
Sud lu puudu futurus tru!
Puudfutur'! Du!

Piedon la buf' ne lavas
Ĉar pigras la bufo, ho!
Bufo loĝas en lageto
Sed la piedo fetoras tro!
Piedfeter'!

Balaton

Balaton

